

Israela milito, kongreso en Tel-Aviv kaj *Kiu eraris* de Hector Hodler

Claude Gacond, 192-a radioprelego, 1967.06.14 & 1967.06.17

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond.

La esperantistaro povas rigardi al Tel Aviv nur kun kor-premo. Tiu urbo ĝuste prepariĝis por ricevi la esperantan popolon por la granda festo nomata Universala Kongreso. Kaj tre verŝajne la bomboj malhelpos la disvolviĝon de tiu manifestacio, kiu simbolas jaron post jaro la esperon al interhoma fratiĝo, kiu loĝas en la koro de ĉiu praktikanto de la lingvo internacia.

Dum la malamaj kreskas, estas tempo rememorigi, ke super la naciismoj nia lingvo vokas nin al homaranismo.

En 1915, dum la homoj sin buĉis en Eŭropo, nia pensulo Hector Hodler, en serio da artikoloj, provis diskonigi verojn, kiuj restas ege aktualaj. Aŭdu erojn el lia artikolo titolita *Kiu eraris* ?

« Ekzistas malsanuloj, kiuj sin okupas pri propra flegado, nur kiam ili estas jam en tia stato, ke duba estas ilia resanigebleco.

Ĝis la ekstrema limo de siaj fortoj ili fanfaronas pri sia bonfarto, malŝate alridas ĉian averton, kaj sin fordonas al ĉiuj eksceso, konfidante, ke kiam la malsano estos en akra stato, la kuracistoj ja scios ĉion rebonigi. Sed se la kuracisto ne sukcesas restarigi la pacienton, tiu ĉi lin mokas, insultas lian sciencon, kaj ĝemas, ne kontraŭ si mem, sed kontraŭ la medicino. Tiam alvenas la kirurgiisto, kiu tranĉas en la suferanta korpo, ĝin iaforte resanigas, ĝin aliffoje mortigas, ĝin plej ofte kondukas al dua kirurgiisto.

Al tia malsanulo iom similas nia homaro.

De longe higienistoj ĝin antaŭgardis kontraŭ la armadfrenezo, klare avertante, ke tiu vetkurado havos danĝeran finon; ili montris, ke sen ia organizo super la nacioj, la ĝisnuna kaoso fatale kondukos al sanga solvo: **ili antaŭvidis**. La antaŭvidemo neniam estis populara. La homaro indiferece aŭskultis ilin. Iliajn admonojn ĝi respondis per novaj armadkreditoj, ĉar, ĉu vere, la “elspezoj por plifortigi la armeojn, ĉiam nepre defendajn, estas la plej bona asekuro kontraŭ la milito”?

La malsano pligraviĝis, ekregis jam febro – simptomo de baldaŭa katastrofo -, sed la malsanulo – aŭ la homaro – nenion volis aŭskulti. Kaj, jen neatendite, sed ne plu forpuŝebla, frapis la krizo.

La malsanulon ĝi ĵetis sur la dolorliton ; la mondon ĝi ĵetis en la sangon.

Furioza la homaro indigniĝas kaj interne blasfemas – ĉar, ĉu ne, neniu en sia animo opinias nun, ke la milito estas bela kaj nobla ? - sed, strange, ĝi indigniĝas kaj blasfemas ne kontraŭ siaj kondukantoj, ne kontraŭ la malsano mem, sed kontraŭ la kuracistoj, kiuj ĝin avertis. Malbenataj, vi estu, naivaj utopiistoj ! Malgraŭ ĉiuj viaj pacaj manifestacioj, viaj homfratigaj teorioj, ni nun suferas tian krizon, kian ni apenaŭ povis imagi. Nenion vi sciis eviti. For, revuloj, dormigistoj, bonintencaj idealistoj ! Pli efikan kuracilon ni nun havas. La milito ĉion solvos. Lasta ĝi estos. Neniu el viaj drogoj aŭ higienkonsiloj estis utila. Oni tranĉu la nun maturan absceson !

La absceson oni nun tranĉas. Sed ĉu la paciento daŭre resaniĝos, aŭ ĉu novajn abscesojn oni baldaŭ devos denove tranĉi ? »

Ni ne povas legi al vi la tutan artikolon de Hector Hodler, pro la limigita tempo de nia elsendo. Sed ni konsilas al vi foje prunti la libron *Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko*,

Israela milito, kongreso en Tel-Aviv kaj *Kiu eraris* de Hector Hodler
Claude Gacond, 192-a radioprelego, 1967.06.14 & 1967.06.17

eldonitan de UEA en 1928. Vi trovos studojn pri la interhomaj konfliktoj, kiuj estas meditindaj.

En tiu artikolo *Kiu eraris* ? Hector Hodler poste sin demandas, ĉu la institucioj, kiuj celis la alproksimiĝon de la popoloj kaj starigon de daŭra paco, meritas kondamnon ? Kaj ĉu bankrotis la ideoj, kiujn ili reprezentas ? Li rimarkigas, ke la aŭtoroj de tiuj ekskomunikoj estas plej ofte personoj, kiuj tute ne konas, kion ili atakas, kaj kiuj neniam faris ian penadon por helpi al la plibonigo de la interpopolaj rilatoj.

Hector Hodler rimarkigas, ke ridinde malgranda estis la materiala potenco de la internaciaj institucioj, kompare kun la premanta supereco de la militfortoj. Miloj da homoj profesie laboras por la preparado de la milito ; miloj, per la gazetoj, en la literaturo, ĉe la lernejo, konstante susbtrekas tion, kio dividas la homojn kaj plifortigas la naciajn antagonismojn, kaj nur kelkaj, malmulte konataj, neserioze apogataj, sin dediĉas al la pacigaj entreprenoj kaj al la malakrigo de la gentaj pasioj.

Ni redonu la parolon al Hector Hodler : « *Nur de malmultaj jaroj oni ekkonsciis pri la homaro, kies diversaj partoj, anstataŭ kontraŭstari unu al la alia, kunlaborus en organizita harmonia tuto. Sed kiom da homoj longe pensis pri tiu idealo ? Kiom da ili sentis sin tiel premataj de ĝi, ke ili dediĉu al ĝi sian energion kaj estu pretaj sin oferi por ĝi ? Ĉu la internaciema spirito, necesa bazo de la tuta konstruaĵo, estis sufiĉe disvastigita, ke ĝi povu kontraŭbatali la instinktojn, la pasiojn, ĉiujn nekonsciajn fortojn, hereditajn el la ĉeno de la generacioj, kaj el kiuj ni povas nin liberigi nur iom post iom, dank'al granda penado ?* »

Hector Hodler daŭrigas : « *La netuja sukceso de ideo tute ne pruvas ĝian erarecon. Ĝi estas pruvo nur por tiuj, kiuj ŝanĝas ideon laŭ la modo, same kiel la virinoj ĉapelsistemon. La esperantistoj scias, ke ili laboras por ideo ĝusta kaj fruktedona, kaj, tamen, la pli granda parto de la homaro staras rilate al ni indiferece aŭ eĉ skeptike. Ĉu el tio ni konkludas, ke Esperanto estas erara kaj ke prava estas la indifereca publiko ? Tiu indiferenteco, kontraŭe, estas nur instigilo por plua agado.* »

Estus ankoraŭ multo citinda. Ni lasas vin trovi tiun libron de la fondinto de UEA kaj malkovri en ĝi penson ege aktualan, kiu eble vin helpas rezisti al la emo bleki kun la blekantoj kaj repensi vian homaranismon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-